

Leterkesto, 2-a parto parto
Java, Javo aŭ Javao
Claude Gacond, 297-a radioprelego, 1969.06.18 & 21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉar pasintsemajne nia leterkesto ne malpleniĝis, ni revenas al nia amika babilado kun niaj geaŭdantoj.

A.- Sinjoro Conrad Fischer en Meadville, Usono, estis tre interesata per niaj prelegoj pri 80 jaroj de esperanta vivo. Pro tio li tradukis anglan niajn kronikojn helpe de la artikoloj aperintaj en *Sennaciulo*. Ĉar li ne ricevis la numerojn, kie troviĝas la ĉapitroj 10 kaj 11, lia traduko ne estas finita. Ni hodiaŭ sendas tiujn numerojn de *Sennaciulo*, kaj ni esperas, ke tiuj tradukoj povos esti utilaj al la anglalingva publiko.

Cl.- Ne ĉiam estas tre facile traduki klarigojn pri esperanto en nacian lingvon, ĉar, laŭ ni, oni devus aldoni kromajn klarigojn pri situacioj, kiujn ne konas la nacilingva publiko. Ni tre esperas ricevi kopion de tiu tradukado por nia persona arkivaro kaj por ĝin submeti al alia anglolingvano.

A.- Por reveni en Eŭropon jen letero de sinjoro J.-P. Hornecker en Morangis, Francio. Lin interesis niaj elsendoj pri la geografia nomenklaturado, kaj li diras : « *Al mi ŝajnas, ke oni ne devas diri Java. Mi pensas, ke ni devas diri : Javao aŭ Javo, kaj ke tio dependas, kie estas la akcento en la vorto.* »

Cl.- Sinjoro Hornecker en tiu frazeto bone respegulas la ĝeneralan sintenon de la nuna esperantistaro. Tiu ĝenerala sinteno aktualiĝis en la mondmapo de Tibor Sekelj, kie Java iĝis Javo kaj en la vortaro Albault-Léger, kie la ekvivalento de la franca Java iĝas en esperanto Javo.

A.- Sed ni faros demandon, kaj ni tre ŝatus, ke multaj geaŭdantoj respondu al ĝi. Ĉu vere estas necese, ke ĉiuj geografiaj nomoj finiĝu per **o** ? Kaj ĉu vere ni rajtas forigi la finan **a** de Java, por akiri la radikon **Jav**, kiu perdis sian internaciecon ?

Cl.- Ni faras alian demandon. Ĉu vi scias, ke foje esperanto estas instruata en publikaj lernejoj, kaj ke poste oni petas al tiuj instruistoj instrui pri geografio pere de esperanto. Tiam se vi estus profesoro pri geografio, kion vi instruus al viaj gelernantoj, ĉu Javo, ĉu Java, ĉu Javao ? Ĉu vi pensas, ke la lernej-aŭtoritatoj longe tolerus instruadon pri geografio, kiu arbitre kripligus geografiajn nomojn universale konatajn kiel Java ?

A.- Kiel ni jam diris, laŭ ni, sur mapo, la geografia nomenklaturado devus esti kiel eble plej fidela al la originala formo. Tiu originala formo tutcerte estas pli proksima de Java, ol de Javo. Kaj poste, la esperantistoj, tiuj kiuj emas aldoni al ĉiuj geografiaj nomoj la substantivan **o**, rajtas tion fari. Sed science ili ne rajtas forpeli finan vokalon kaj ĝin anstataŭi per **o**. Tio estas kripligo, kiun la geografoj neniam akceptos.

Cl.- Ni komprenas, ke la popola publiko ŝatas la simplajn solvojn kiel Javo por Java. Ili simple trudas al la geografia nomenklaturado la gramatikajn leĝojn, kiuj valoras por la negeografia vortaro. Sed, tiuj esperantistoj, se ili estus konsekvencaj, ankaŭ devus trudi tiun finaĵon al la ceteraj propraj nomoj. Kion vi dirus, sinjoro Hornecker, se mi transformus vian nomon en Hornekero, kaj se mi transformus la nomojn Baghy kaj Lanti en Bago kaj Lanto ?

A.- Tio tutcerte ŝajnas al vi herezaĵo. Transformo de Java, Helsinki, Korfu en Javo, Helsinko kaj Korfo ŝajnas al ni la sama herezaĵo, kaj ni estas absolute certaj, ke neniam veraj geografoj akceptos similajn kripligojn.

Cl.- Ni ĵus ricevis leteron kun kongresmarko anoncanta la 54-an Universalan Kongreson. Jen kion ni legas sur ĝi :

Leterkesto, 2-a parto parto
Java, Javo aŭ Javao
Claude Gacond, 297-a radioprelego, 1969.06.18 & 21

A.- *54a Universala Kongreso de Esperanto. Helsinki.* De longe UEA rezignis pri tiuj kripligoj, kaj ni pensas, ke ili pravas. Ili konstatis, ke tiuj kripligoj estas danĝero por la ekspansio mem de nia lingvo.

Cl.- Fine ni pensas, ke se hodiaŭ la tuta esperantistaro kripligus ĉiujn eblajn geografiajn nomojn, morgaŭ okazus reago, kiu revenus al pli universalaj formoj, kiuj respektas la personecon de la geografiaj nomoj.

A.- Konklude : se vi deziras aldoni la vokalon **o** post geografia nomo, evitu kripligi la radikon kaj konsideru kiel radikon la tutan vorton : do konsideru kiel radikon la formon Java. Poste faru kion vi volas, diru Javao aŭ Java, tio estas via afero. Sed de la momento kiam vi vin riskas forpeli la finan **a**, vi vin permesas domaĝon, kiu kripligas formon, kiu estas universale konata, ne sub la vesto **Jav**, sed **Java**.

Cl.- Ni longe respondis al nia franca samideano, ĉar multaj aliaj leteroj tuŝas tiun demandon. Ni mem troviĝis antaŭ la tasko instrui pri geografia pere de esperanto. Ni devis solvi la problemon rezignante pri tiu eksperimento, kaj tio estis perdo por esperanto.

A.- Hodiaŭ ni ne plu havas la tempon pro ĉerpi alian leteron, kiu parolas pri la temo geografia nomenklature. Tion ni rezervos por la venonta semajno, por havi la tempon longe esprimi nian vidpunkton. Sed bonvolu vin esprimi. Ni citos vin. Ni pensas, ke la momento preni decidojn venis.

Cl.- El Islando venis interesa letero de sinjoro Kristöfer Grimsson en Reykjavik. Permesu citaĵon :

A.- « *Kiam mi aŭskultis vin, mi aŭdis sinjorinon Privat. Tio min interesis, ĉar mi jam estas koninta kun ŝia mortinta edzo Edmond Privat per mia islandigo de lia interesa **Aventuroj de Pioniro**, kiu estis ĉi tie eldonita lastjare en novembro. Lian genian verkon **Vivo de Zamenhof** mi ne povas forlasi sen islandigi ĝin, kaj eldonigi se mi povos akiri eldonpermeson de la angla eldonanto. »*

Cl.- Ĉu vi scias, karaj geaŭdantoj, ke ekzistas Amikaro de Edmond Privat. En la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds troviĝas la adresaro de ĉiuj esperantistoj, kiuj deziras esti informataj pri la eldonado aŭ tradukado de novaj verkoj de tiu granda pioniro de esperanto. Sinjoro Grimsson, ĉu vi ricevis la cirkulerojn, kiujn eldonis la Amikoj de Edmond Privat kaj ĉu vi informis sinjorinon Privat pri via laboro ? Ni hodiaŭ sendas al ŝi vian interesan leteron, kiu tutcerte faros al ŝi grandan plezuron.

A.- Kio nin impresas, estas la laboremo de la esperantistoj. Estas pruvo pri la vigleco de nia movado. Konstante novaj iniciatoj venas kompletigi la komencitan laboron. Ni povas fieri pro nia aparteno al tiu popolo, kies patrio estas la tuta mondo, kaj eble baldaŭ pli ol la planedo Tero.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-